# *Manko de travideblo plus manipulado regas en la forumo de la civila socio en Peruo.*



Lima, 12 apr (RHK) La delegitoj al la forumo de la socio civila kritikis la manieron kiel oni organizis la debatojn,  la  mankon de reprezenteco kaj malklarecon en la metodoj por elekti la reprezentanton kiu alparolos  dum la plenkunsido de la 8-a pintkunsido de la Amerikoj ?i-14an de aprilo.

La? la formato de la evento, desegnita de la organizo de amerikaj ?tatoj (OEA), inter mardo kaj merkredo devintus kunsidi en la perua ?efurbo la 28 temaj koalicioj por starigi sendependajn debatojn kaj elekti reprezentanton anta? la dialogo kun la registaraj funkciuloj de tiu ?i ?a?do.

Tamen, kiam kunsidis la unuaj 14 koalicioj, la partopreno estis minimuma, kaj nur postagmeze dum la sesioj de la koalicio 15  “Por mondo inkluziva kaj respektema” kie grupi?as plejmulto de la kubaj delegitoj, ?i estis pli multenombra.

Fermín Quiñones, kunordiganto de la koalicio, emfazis ke tiu ?i ne estas formo por diskuti travideble, inkluzive kaj demokratie. Li aldonis ke estas duboj pri vera debato malferma, sincera kaj konstrua.

Siaflanke, la argentino Raúl Mañaco, de la koalicio 7, ali?is al la kritiko kaj aldonis ke ilia grupo arigas 60 organizojn kun malsamaj programoj, kaj pro tio estas neebla esprimi siajn kriteriojn en tri minutoj, la? la postuloj de la organizantoj, kiu estos la tempo disponebla por la parolistoj en la dialogo kun la registaraj funkciuloj.

Krom la kritikoj pro manko de travideblo kaj demokratio, la forumo de la civila socio estis uzita en la pasinteco por ataki landojn kiuj ne ?uas la ?aton de Usono a? de la OEA.

Kubo denuncis la inkluzivigon de personoj pagitaj de Usono kvaza? ili estus reprezentantoj de la kuba civila socio, kio same okazis en la pintkunsido en Panamo 2015.

La ?eesto de tiuj dungitoj en Limo ne hazardas, sed apartenas al projekto financata de Usono por supozata partopreno de la civila socio en la pintkunsidoj de la Amerikoj. Al tiu projekto Usono dedi?as milionajn bu?etojn kun la celo influi la publikan opinion.

La koalicio 15 elektis la kubaninon Mirthia Brossard, prezidantino de la kontinenta organizo latinamerika de studentoj (OCLAE) kiel la parolistino kiu partoprenos la dialogon kun politikaj funkciuloj.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/159745-manko-de-travideblo-plus-manipulado-regas-en-la-forumo-de-la-civila-socio-en-peruo

Radio Habana Cuba